



La 43a Korea Kongreso de Esperanto

La 98a Japana Esperanto-Kongreso

apud Seulo, en

**Centra Trejnado-Instituto
de Korea Saemaul-Movado**

kongresa temo

Esperanta amikeco kaj interkompreniĝo trans la maro

kontakto-adresoj

Korea Esperanto-Asocio, 1601 Kang Byeon Hanshin Core,
350 Mapo-dong, Mapo-ku, Seoul-121-703, tel. +82-2-717-6974,
fakso: +82-2-717-6975: retpoŝto: kea@esperanto.or.kr

Japana Esperanto-Instituto, JP-162-0042, Tokyo-to
Sinzyuku-ku Waseda-mati 12-3, tel.: +81-3-3203-4581, fakso:
+81-3-3203-4582, retpoŝto: jek11s@jei.or.jp, TTT-paĝaro:
<http://jei.or.jp/evento/2011/kk/>

Kongresu por Nia Komuna Estonteco!

Por la unua fojo en la historio de la Esperanto-kongreso en Koreio kaj Japanio, ni havos la Komunan Kongreson. Ĝi celas inter alie, ke esperantistoj en ambaŭ landoj havos komunan tempon kunĝoji, babili, diskuti, eĉ disputi en unu lingvo.

Tio ĉi estas la rezulto de la longa historio de Esperanto-agadoj en la du landoj, kiel estas jene resumite.

Jam pasis pli ol 120 jaroj ekde publikigo de Esperanto en 1887.

En ambaŭ landoj Esperanta movado progresadis ĝis nun, okaziginte la 50an UK en Tokio kaj la 21an IJK en Ootu en 1965, la 79an UK en Seulo kaj la 50an IJK en Chonan en 1994, la 3an Azian Kongreson en Seulo en 2002 kaj la 92an UK en Jokohamo en 2007. Prof. YAGI Hideo estis la prezidanto de UEA de 1962 ĝis 1964 kaj prof. Lee Chong-Yeong estis ankaŭ tiu de 1995 ĝis 1998.

La unua Komuna Seminario okazis inter esperantistoj koreaj kaj japanaj en Sokcho en Koreio en 1982. Ĉi-jare okazos la 29a KS en Hanojo en Vjetnamio. "Historio por Malfermi Estontecon" (Moderna Historio de Ĉinio, Japanio kaj Koreio) eldoniĝis traduke en Esperanto kunhelpe de trilandaj Esperantistoj en 2007.

En Koreio la unua esperanta kurso okazis en 1920 kaj fondiĝis Korea Asocio Esperantista en la sama jaro. En 1946 la unua Korea Kongreso de Esperanto okazis en Seulo post malfacila cirkonstanco. Ĉi-jare okazos la 42a KKE en Taegu.



En Japanio fondiĝis Japana Esperantista Asocio en 1906 kaj la unua Japana Esperanto-Kongreso okazis en Tokio en la sama jaro. Ĉi-jare okazos la 97a JEK en Nagasaki. Ni, ambaŭlandaj Esperantistoj, havas longan historion de Esperanta movado. Por plua progreso ni kunhelpu unu al la alia, lernante valorajn travivaĵojn de la movado.

Ni alvokas esperantistojn partopreni en la unua provo de la Komuna Esperanto-Kongreso de Japanio kaj Koreio, kiu okazos en oktobro de 2011 sub la temo, "Esperanta amikeco kaj interkompreniĝo trans la maro".

Invitas vin...

Seulo, la ĉefurbo de Korea Respubliko, enhavas loĝantaron de ĉirkaŭ 10 milionoj el la 45-miliona loĝantaro de la tuta lando. Ĝi estas financa, politika, komerca, eduka, distra kaj kultura centro de la lando, kaj estas hejmloko de ĉefaj sidejoj de



(foto de © Tom Yam: www.yamphoto.net)

korporacioj, financaj instancoj, ŝtataj oficejoj, tre diversaj lernejoj kaj universitatoj, teatroj kaj amuzrimedoj. Por lokaj loĝantoj kaj eleksterkoreaj vizitantoj tie troviĝas riĉa kaj kontentiga vario de aĵoj por vidi kaj fari.

Seulo estis iama sidejo de registaro en la regno Baekje, pli ol 1500 jarojn antaŭe. Sed la vera genezo de la urbo komenciĝis en 1394, kiam ĝi fariĝis la ĉefurbo de la dinastio Joseon (1392-1910). En 1994 Seulo festis sian 600-jarrevenon kiel ĉefurbo. La dinastio Joseon, fama pro siaj kulturo kaj arto, viva vidiĝas en la urbo hodiaŭ: kvin el la originalaj pordegoj kaj partoj de la 16-kilometra urbomuro estis renovigitaj, kaj kvar ĉefaj palacoj de la dinastio Joseon kaj unu ĝardeno kun reĝaj praavaj sanktejoj pli kolorigas kaj ĉarmigas modernan Seulon.



(foto de © HO Song)

Seulo estas unu el tiuj urboj, kiuj ĝis nun konservis la arkitekturajn simbolojn de la pasinteco meze de sia transformiĝo al metropola urbo. La loko de la olimpikoj en 1988, Seulo plu sin modernigis, ankoraŭ atente konservante la valoran heredaĵon nutritan per ĝiaj antikvaj urbomuroj.

La Kongresejo...

Centra Trejnado-Instituto de Korea Saemaul-Movado estas brakumita de freŝa naturo kaj situanta en urbo Seongnam apud Seulo. Ĝi enhavas sufiĉe da salonoj, tranoktejoj, restoracion ktp. kun favora prezo. Plejparte da Kongresaj agadoj okazos tie ĉi. Kongresanoj venantaj tra flughavenoj veturos per flughavena aŭtobuso ĉirkaŭ unu horon unue al la urbo Seongnam. Kaj veturŝanĝinte ĉe Seongnam-bushaltejo, oni aŭ piediros aŭ veturos per aŭto ĉirkaŭ tri kilometrojn ĝis la kongresejo. (la adreso kaj TTT-paĝaro: 200, Yul-dong, Bundangu, Seongnam-Si, Gyonggi-do, Korea (463-742); <http://www.sucti.com/english/index.asp>)

한일공동에스페란토대회

제 43 회 한국에스페란토대회

제 98 회 일본에스페란토대회

일시 : 2011 년 10 월 7 (금) ~9 (일) 일

장소 : 경기도 성남시 분당구 율동 200 새마을운동중앙연수원

대회주제 : 바다를 건너 에스페란토로 나누는 우정과 상호 이해

주최 . 주관 : 사단법인 한국에스페란토협회

121-703 서울 마포구 마포동 350 강변한신코아빌딩 1601 호 / 전

화 : (02)717-6974 전송 : (02)717-6975 전자메일 : kea@esperanto.or.kr



(fotografii de © Tom Yum: www.yumphoto.net)

日韓共同開催エスペラント大会

第 98 回 日本エスペラント大会

第 43 回 韓国エスペラント大会

- 日時 : 2011 年 10 月 7 日 (金) から 9 日 (日) まで。10 日 (月 / 祝日) に帰国できます。
- 場所 : 韓国ソウル市近郊 セマウル運動中央研修院
- 大会テーマ : エスペラントによる海を越えた友好と相互理解
- 主催団体 / 問い合わせ先 : 財団法人日本エスペラント学会
162-0042 東京都新宿区早稲田町 12-3 tel.: 03-3203-4581, fakso: 03-3203-4582, メール jek11s@jei.or.jp, ホームページ : <http://jei.or.jp/evento/2011/kk/>